

S.A.T.-Kongreso en Parizo
Claude Gacond, 411-a radioprelego, 1971.08.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi someron, dum la sama semajno, okazis en du grandaj ĉefurboj du grandaj esperanto-kongresoj. Dum en Londono disvolviĝis la Universala Kongreso de Esperanto kun pli ol 2000 partoprenantoj, en Parizo disvolviĝis tiu de Sennacieca Asocio Tutmonda kun pli ol 500 partoprenantoj.

A.- Pri la Universala Kongreso de Esperanto raportos nia prelegkolego doktoro Arthur Baur dum unu el la venontaj elsendoj. Ĉar ni ĉeestis la SAT-kongreson, ni raportos pri tiu manifestacio.

Cl.- Antaŭ kelkaj monatoj, kiam ni aliĝis al la 44-a kongreso de SAT, kiu devis celebradi la 50-jariĝon de tiu asocio, ni antaŭvidis, ke programeroj profitos tiun okazon por paroli aŭ diskuti pri la ĉefa originalaĵo de SAT, la sennaciismo. Fakte tiurilate nenio okazis.

A.- La kongresejo mem estis ideala. Ni kunsidis, ni manĝis kaj ni dormis en la nova fakultato de Orsay. Oni ne povas imagi pli idealan kongresejon. Tiu fakultato okupas 160 hektarojn en granda arbaro, kie estis konstruitaj domgrupiĝoj por ricevi 12'000 studentojn. Tiel ni vivis en kamparana etoso for de la bruoj kaj de la gasoj, tio tute proksime de la urbejo Parizo.

Cl.- SAT-kongreso tute ne estas komparebla kun Universala Kongreso de Esperanto organizata de UEA. Ĝi similas al Ĝenerala Kunsido de grava societo. La plej granda programero estas la laborkunsidoj, kiuj grupigas en grandega salono ĉiujn kongresanojn, kiujn la vivo kaj la agado de SAT interesas. Tiun ĉi jaron okazis 5 tiaj po 2-horaj labor-kunsidoj. La lasta eĉ voris la tempon, kiu estis antaŭvidita por forumo, kies temo devis esti : rerigardo al la kongreso.

A.- Ni persone sufiĉe regule frekventis tiujn laborkunsidojn, kaj ni ricevis la impreson, ke ili disvolviĝas laŭ kunsida tekniko eksmoda, kie la bablado ne ofte kondukas al pozitivaj rezultoj. Ĉiutage ŝanĝiĝas la prezidanto, kaj ni povis konstati, ke tiuj prezidantoj ofte ne havas superrigardon pri la pritraktataj temoj. Nombrante la kunsidantojn ni konstatis, ke tagon post tago ilia nombro malaltiĝis. Kaj provante resumi la decidojn de tiuj multhoraj kunsidoj, ni konstatas, ke ili estas tre nebulaj. Tute SAT devos renovigi siajn kunsidkutimojn, se ĝi volos ĉesi malkreski.

Cl.- Apud tiuj laborkunsidoj okazis en diversaj salonetoj fakaj kunvenoj, kiuj grupigis la frakcianojn de SAT. Tiel kunsidis la liberecanoj, la redaktoroj kaj legantoj de la organo *La Juna Penso*, la vegeteranoj, la mondĉivitanoj, la pacistoj, la sennaciistoj, la liberpensuloj. La junuloj havis ofte propran programon, kiu disvolviĝis sur la herbejo inter la manĝejo kaj la kongressalono.

A.- La 44-a kongreso de SAT estis solene malfermita en la salonego de la fama universitato La Sorbonne. Gaston Waringhien prononis belan kaj interesan malferman paroladon, kiu rememorigis la gravan rolon de tiu loko La Sorbonne por la penslibereco. Poste estis alvokitaj tiom da salutantoj, ke Lucien Bannier, kunfondinto kaj prezidinto de SAT ne plu havis la tempon prononci sian saluton al la granda familio de SAT !

Cl.- Dum tiu kongreso antaŭviditaj programeroj ofte ne povis efektiviĝi, tio verŝajne ĉar la organizantoj ne antaŭkalkulis sufiĉe da tempo por la amasproblemoj. Ekzemple la ekskurso al Reims fariĝis hontindaĵo, dum kiu oni nur sidis en aŭtobusoj dum la tuta tago kaj eĉ ne vidis unu ŝtonon de la gotika katedralo, kiu fakte estis la celo mem de la ekskurso, tio ĉar la forveturo okazis kun du horoj de malfruiĝo kaj ĉar la vojaĝo estis multe tro longa. Ĉiutage antaŭ ĉiu manĝo ni devis vice stari dum foje pli ol unu horo, simple ĉar 500 personoj invadis

S.A.T.-Kongreso en Parizo
Claude Gacond, 411-a radioprelego, 1971.08.25 & 28

samtempe tiun universitatan restoracion memservan. Por la vizitado de la palacoj en Versailles unu sola gvidisto devis paroli al pli ol cent personoj. Lian voĉon ni eble ankoraŭ aŭdetis, sed tiun de la tradukisto preskaŭ neniŭ aŭdis, kaj malmultaj estis la personoj, kiuj povis vidi la salonojn, tiom ni estis premitaj unuj al la aliaj. Tiuj amasproblemoj nesolvitaj fariĝis pli kaj pli tedaj tagon post tago.

A.- Okazis du prelegoj : Gaston Waringhien parolis pri la evoluo de la homa skribo kaj Hugo Röllinger pri la evoluo de la pentroarto de la prahistoria homo. Du intereseĝaj prelegoj, kiuj bedaŭrinde devis esti prononcataj en konstanta bruo de alvenantoj kaj forirantoj.

Cl.- La supro de tiu kongreso de SAT tutcerte estis la arta vespero, en kiu kantis Ramona van Dalsem kaj aktoris Nikolaj Rytjkov, ambaŭ venintaj el Londono, kie ili ankaŭ ludis rolon. En tiu momento la esperantistoj, kiuj plenigis la salonegon (multaj estis venintaj el Parizo) eksentis la profundan belecon de la lingvo internacia de Zamenhof.

A.- Kun Parizo ni havis belan kontakton okaze de vespera promenado perŝipa sur la rivero Seine. Alian vesperon ni ĉeestis striptizan spektaklon sufiĉe interesan, kiu efektiviĝis en superhejtita saloneto. Kaj tutan posttagmezon ni havis la okazon promeni en la muzeo Le Louvre kaj en la ĉirkaŭaĵo.

Cl.- Dum la tuta semajno funkciis en la restoracia kongresejo libro-servo, kiu estis vera modelo. Tie povis sidi kaj babili la libro-amatoroj kaj la skribemuloj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-